SEK-Bulteno

Informilo de Saenzpenja Esperanto-Klubo

Eldonita ekde la jaro 1990. Hispanlingve kaj en Esperanto.
Diskonigas pri la Internacia Lingvo kaj ĝeneralaj regionaj novaĵoj

N°3 4 | januaro-marto | 2012 [1]











Nia urbo festis sian 100-an datrevenon

Informo: sur p. 3-6; 10

SEK-Bulteno

N° 34 Enero-Marzo 2012 [1]
Órgano Oficial del
Club Saenzpeñense de Esperanto
Se publica desde noviembre de 1990

Distribución
SEK-Bulteno se edita y difunde con la colaboración voluntaria de los miembros y simpatizantes de SEK y su distribución es gratuita.
Se envía a más de 600 direcciones de correo electrónico de esperantistas y simpatizantes en más de 32 paises.
También puede ser leído y/o "bajado" de: www.gazetejo.org

Redacción
Calles 119 y 122
H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña
Chaco, Argentina

E-mail:
rubendiaconu@yahoo.com.ar

www.facebook.com/rubendiaconu

Redactor
Rubén T. Diaconu Tkachenco
Miembro y Delegado local de UEA
(*Universala Esperanto-Asocio)*
Holanda

Colaboradores
Tony Stacul (Chaco)
Emmanuel Maggiori (Buenos Aires)
Carlos Devizia (Buenos Aires)
César Dorneles Soares
(Porto Alegre-BR)

Tapa: Mural del Centenario y Plaza San Martín. (Fotos: *Facebook* de Víctor Fernández y Alejandra Kaleniuk)



Estimados lectores:

Estamos iniciando un nuevo año de labor, pero éste no será uno más, pues es el año del Centenario de Pres. Roque Sáenz Peña y por lo tanto nuestro compromiso es mayor. Es verdad que nuestra ciudad es muy joven, si la comparamos con similares del continente europeo o asiático. Sin embargo en estos 100 años de pujante labor su floreciente crecimiento se ha hecho evidente por doquier.

En cambio, reconocemos que en los últimos meses la actividad de nuestro club de esperanto no ha sido tan abundante como en otros tiempos, a excepción de la gran expectativa puesta en la posibilidad de que Argentina sea la sede del Congreso Mundial de Esperanto en 2014. Al cierre de esta edición aun no sabemos cuál será la decisión de UEA al respecto.

En otro sentido, también nos gustaría haber tenido más novedades sobre actividades concretas por parte de nuestra entidad nacional. Ĝis!

La Redacción

Traductor de Google ahora también en esperanto


El servidor más popular de la web incorporó el idioma internacional esperanto a su traductor automático *Translate*, sumando así las 64 lenguas más utilizadas en el mundo.
http://translate.google.es/

Este nuevo paso en el progreso del esperanto demuestra una vez más la actual y constante vigencia de la única lengua neutral creada hace 125 años.

http://www.liberafolio.org/2012/google-ektradukas-esperanton

Nuestra ciudad en su centenario

Presidencia Roque Sáenz Peña -o simplemente **Sáenz Peña**- es la segunda ciudad más poblada de la provincia del Chaco, Argentina. Es la cabecera del departamento Comandante Fernández. En la provincia suele designársela como *La Termal*, por las aguas termales que constituyen uno de sus principales atractivos turísticos.



Soldados expedicionarios

Historia de la fundación

Cuando se proyectaban las vías del ferrocarril Barranqueras a Metán (Salta), se encargó al teniente coronel Pedro Amarante la búsqueda de terrenos aptos para la fundación de una colonia agrícola a partir del kilómetro 120 de dichas vías. Tras acampar en el km 177, el teniente coronel Carlos D. Fernández relevó a Amarante, y al parecerle inapropiado el lugar para el asentamiento resolvió desplazar el mismo al km 173, basándose en sus propias exploraciones y en el informe del Ingeniero Antonio Schulz.

El asentamiento se realizó en el que hoy se denomina *Ensanche Sur*, pero las primeras 100 manzanas comenzaron a delinearse en el sector norte. Los solares eran de un cuarto de manzana (cada una de 100 metros de lado), y aquellos que no fueron reservados como espacios o edificios públicos, fueron vendidos a los pobladores a razón de 10 pesos el solar. Los primeros habitantes fueron seis españoles procedentes de Resistencia, quienes recibieron su título de propiedad de manos del Cte. Fernández el 1° de marzo de 1912, fecha que se toma como fundación de la ciudad. Poco tiempo después Fernández viajó a Buenos Aires para solicitarle al Presidente Roque Sáenz Peña que el



poblado llevase su nombre. El 24 de octubre de 1912 el "Km 173" fue bautizado como *Presidencia Roque Sáenz Peña*.

Los primeros pobladores y colonos

El mismo día de la fundación de Pcia. Roque Sáenz Peña el Comandante Fernández hizo entrega de los títulos precarios de lotes de tierra a los seis primeros pobladores que llegaron por ferrocarril desde Resistencia. Estos eran de nacionalidad española y se trataba de: Miguel, Juan y Ricardo Vargas Giménez, Pedro Gómez Parra, Angel Rascón y José Ibáñez Castillo**.** En los meses posteriores se fueron agregando otros pobladores; algunos venían del sur, otros de colonias vecinas y otros procedían del extranjero. Ante el número creciente de pobladores que llegaban para radicarse, fue necesario ampliar muy pronto el ejido de la localidad.

Mientras tanto contingentes de inmigrantes italianos, españoles y franceses fueron ocupando las colonias con el aliciente de la posibilidad de obtener en propiedad lotes en los campos fiscales.

Durante los años 1925 a 1935, se produjo la entrada de 25.000 inmigrantes de diversos origenes; eslavos, ucranianos, polacos, yugoslavos, checos, búlgaros, italianos y otros, quiénes ocuparon lotes de las nuevas colonias agrícolas.

El transcurso de 1878 a 1930 se caracterizó por el auge de la explotación forestal. Esta época ha quedado marcada por la presencia del hachero, las fábricas de tanino y los interminables trenes de vagones cargados con rollizos.

Con el tiempo, la explotación algodonera ha superado a la forestal.

La siembra del algodón tuvo su primera manifestación en el año agrícola de 1912-1913, es decir casi inmediatamente al momento de su fundación. El primero que ensayó su cultivo con resultados satisfactorios fue el poblador Francisco Aguado Baños**.** Esto lo llevó a repetir la experiencia al año siguiente, acompañado de otros colonos que se sumaron a la gesta algodonera y marcando así desde sus orígenes el futuro económico de la zona.

A mediados de los años 30, en el centro del territorio chaqueño se extendían cientos de miles de hectáreas de campos de algodón. La localidad de Sáenz Peña era conocida como la "capital argentina" de producción algodonera.

Su desarrollo económico

A partir de la década de 1920 Pcia. Roque Sáenz Peña, convertida ya en el centro de una colonia numerosa, comienza a desplazar a otros pueblos en importancia comercial e industrial. En 1923 se constituyó la Liga Comercial, Agrícola e Industrial de gran incidencia en la vida social y económica de Sáenz Peña. Esta institución gestionó ante las autoridades del Territorio y de la Nación, la solución de los múltiples problemas que planteaba el crecimiento económico de la colonia. Así logró en 1924 la inauguración de una sucursal del Banco de la Nación. Esta institución era muy necesaria por cuanto



La producción algodonera fue primordial desde 1912

Sáenz Peña se había convertido ya en el eje del desarrollo de otras localidades del centro chaqueño que canalizaban su producción hacia este centro de comercialización. De ese modo, muchos trámites de carácter económico o financiero que hasta ese momento debían realizarse en Resistencia, podían ya efectuarse en esa ciudad evitando los penosos e inseguros viajes hasta la capital del Territorio. Para ese año ya funcionaban cuatro desmotadoras de algodón que recibían la fibra de la colonia circundante y de otras localidades vecinas.

Los problemas derivados de la comercialización de sus productos, especialmente del algodón, movieron a los colonos a agruparse en defensa de sus intereses. Así nacieron: la "Cooperativa Agrícola Ltda. de Presidencia Roque Sáenz Peña, Chaco", el 11 de Junio de 1925 y varios años más tarde, el 19 de enero de 1930 se fundó la que después sería: la "Cooperativa Agrícola El Progreso Ltda." y el 7 de Febrero de 1937 cobró vida la "Cooperativa Agrícola La Unión Ltda". A través de estas cooperativas, los agricultores agrupados en ellas no sólo pudieron comercializar con más seguridad y ventaja su producción, sino que pudieron instalar sus propias desmotadoras y centros de comercialización. De ese modo, el movimiento cooperativista, de tanta incidencia en el desarrollo económico del entonces *Territorio Nacional del Chaco* en esos años, tuvo en Pcia. Roque Sáenz Peña uno de los centros de mayor desarrollo y protagonismo.

En la actualidad la producción agropecuaria abarca la cría de ganado, como así también la producción, además del algodón, de distintos tipos de cereales y oleaginosas.

Principales atracciones turísticas

A 100 años de su fundación Sáenz Peña cuenta hoy con varias atracciones turísticas, entre las que se destacan:

- Complejo termal: en pleno centro de la ciudad el complejo permite baños en aguas de gran valor curativo. Según la Sociedad Argentina de Estudios Termales la composición química y la termalidad otorgan una excelente acción terapéutica balucoterápica.

- Complejo Ecológico y Zoológico: a partir de un pequeño zoológico creado en 1978 se creó un parque de 150 hectáreas, con una zona recreativa para esparcimiento. Se destaca el zoológico con alrededor de 2.000 ejemplares de más de 200 especies (en su mayoría autóctonas); y también cuenta con una reserva botánica de 20 hectáreas con un sendero de 1 km para la observación de árboles, pájaros y reptiles; una reserva zoológica de 60 hectáreas; un vivero de especies forestales y ornamentales; un centro de recuperación –de primer nivel- de animales silvestres; y un complejo recreativo y educativo.



Entrada al Parque Ecológico y Zoo

- Museo de la Ciudad: situado en la primera estación de trenes, donde se conservan objetos y documentos relativos a la historia local.

- Un establecimiento notable de la ciudad es el Hotel Gualok (4 estrellas), que forma parte del complejo integrado por las termas antes mencionadas. Fue una iniciativa del Gobierno del Chaco a través de la Lotería Chaqueña, buscando fomentar el turismo en Sáenz Peña a comienzos de los años 1970. El hotel fue diseñado en un vanguardista estilo moderno por los arquitectos Aftalión, Bischoff, Egozcué y Vidal en 1971, y recién fue inaugurado oficialmente el 14 de diciembre de 1981. *Gualok* en lengua toba significa "algodón", y así estuvo administrado por el ente organizador de la Fiesta Nacional del Algodón durante los siguientes años. Más tarde volvió a manos de la Lotería Chaqueña, y el hotel sufrió la falta de mantenimiento y el deterioro. En 2010, fue refaccionado y concesionado a la compañía *Atrium*.



Vecinos del Barrio. Inauguración del cartel indicador.(2007)

Pcia. R. Sáenz Peña y el esperanto

La lengua internacional esperanto se enseñó por primera vez en el año 1945, por el profesor checo Milos Brunclink. Luego se dictaron los cursos de 1988, en la Sociedad Yugoslava, a cargo del quitilipense Prof. Francisco L. Veuthey. En el mes de julio de 1989 se llevó a cabo el 49º Congreso Argentino de Esperanto y el 20 de agosto se fundó el Club Saenzpeñense de Esperanto, *(Saenzpenja Esperanto-Klubo)*. A partir de ese entonces se realizaron numerosas y constantes actividades: cursos de esperanto de diversos niveles en la Sociedad Yugoslava, la EET 23 y el Ce. Cu. Id.; conferencias en el Hotel Gualok; campamento de verano en el camping "El Descanso"; exposiciones en la Casa de Cultura; etc.



Desde 1990 se edita regularmente el boletín *SEK-Bulteno* con una distribución internacional vía internet en más de 30 países.

Entre los miles de sitios y monumentos del mundo que rinden homenaje al este idioma, el boulevard (calle 103) del Barrio Sarmiento y la plaza del Barrio Oro Blanco llevan el nombre Esperanto.

Esperanto en Nicaragua
6 de febrero de 2012

TIENE 125 AÑOS DE EXISTENCIA Y SE HABLA EN 120 PAÍSES

Esperanto, un idioma que busca la universalidad

Fue creado en 1887 en lo que hoy es Polonia, con la esperanza de que se convirtiera en lengua auxiliar internacional… y hoy es una lengua viva y vigente en todo el mundo.

Rafael Lara | **Nacionales** |
EL NUEVO DIARIO.com.ni

*Amikan saluton en Esperanto por la legantoj de **EL NUEVO DIARIO**.*



Mallely Martínez, directora de la Federación Mexicana de Esperanto, Meyling Palma directora Esperanto-Nicaragua, y Martin Schaffer, representante de la Asociación Universal de Esperanto. (Miguel Molina)

La frase anterior significa "Un amistoso saludo en Esperanto para los lectores de **EL NUEVO DIARIO**", un idioma que según sus impulsores, tiene al menos 125 años de existencia, y poco a poco está tomando terreno a nivel mundial, para asentarse de manera universal.

"Esperanto es esperanza", nos dice Mallely Martínez, representante de la Federación Mexicana de Esperanto, quien está de visita en Nicaragua promoviendo su aprendizaje, y nos explica que fue creado en 1887 en lo que hoy es Polonia, por el oftalmólogo polaco de origen judío, Lázaro Zamenhof, como resultado de una década de trabajo, con la esperanza de que se convirtiera en la lengua auxiliar internacional.

Según Martínez, se creó en esta zona del mundo como una forma de unir con un idioma a una región multicultural y en conflictos por falta de comprensión.

Aseguró que el idioma se habla en 120 países como lengua auxiliar de comunicación universal, por encima de barreras étnicas, lingüísticas y estatales.

"Nosotros no queremos sustituir ningún idioma en ningún país. Esto no tiene ideología ni religión. Nuestro propósito es que sea solo una herramienta, un medio de comunicación y de comprensión. Recordemos que cuando se pierde un idioma se pierde una cultura, y eso no es nuestra intención", afirmó Martínez.

Dijo que el Esperanto es de fácil comprensión, pues la mayoría de sus raíces son de origen latino y germánico.

Entre sus características está que todas las letras se pronuncian de manera similar a su equivalente minúscula en el Alfabeto Fonético Internacional, AFI, con la excepción de la c y las letras acentuadas. Su alfabeto tiene 28 letras, son cinco vocales y 23 consonantes, dos de las cuales son semivocales y no incluye la q, w, x, y excepto en nombres extranjeros no asimilados.

Se habla en más de 120 países

Martin Schaffer, representante de la Asociación Universal de Esperanto, expresó que al menos 120 países tienen una sede de Esperanto, algunas como asociaciones civiles y otras como parte de la organización internacional que tienen contactos incluso con la Organización de Naciones Unidas y la Unesco.

"Nuestro interés en promoverlo es por dos razones. En primer lugar, para que todos tengamos mayor comprensión entre países y se pueda disfrutar de la diversidad de la cultura. En segundo lugar, está la creación de un puente entre los pueblos", comentó, alegando que sería un idioma común alternativo y más allá de la lengua materna.

En Esperanto existen una serie de títulos literarios, canciones e incluso películas, así también en sus páginas web pueden hacerse traducciones.

Esta semana se llevó a cabo el Tercer Congreso Nacional de Educación, en la Universidad Nacional Autónoma de Nicaragua, UNAN, y hay un proyecto para que en 2013 se impartan cursos intensivos de Esperanto, para quien desee aprenderlo.

En la actualidad se está preparando a profesores nicaragüenses. Piden a las personas interesadas en el tema que se conecten al correo electrónico:

info@esperanto-nicaragua.org

o al sitio web de Esperanto en Nicaragua.

Argentina: ¿sede del Congreso Universal de Esperanto 2014?

Por Cuna de la Noticia
- 17 diciembre, 2011-
Publicado en: Cultura, Locales

Autoridades de la asociación que difunde esa lengua a nivel internacional visitaron la ciudad de Rosario para proponerla como sede del evento anual que reúne a participantes de todo el mundo.

La intendenta Mónica Fein, junto al secretario de Turismo municipal, Héctor De Benedictis, recibió al Secretario de Congresos de la *Universala Esperanto-Asocio* (UEA), con sede en Rotterdam, Holanda, Clay Magalhaes; y de la presidenta de la Liga Argentina de Esperanto, Silvia Rottenberg, quienes se encuentran en la ciudad recorriéndola para proponerla como sede del Congreso Universal de Esperanto 2014.

Anualmente, la UEA realiza congresos internacionales donde asisten representantes de entidades que difunden el esperanto en todo el mundo, realizándose el primero de ellos en 1905 en la ciudad de Boulogne Sur Mer, Francia.

El año pasado (2010) el encuentro se realizó en Cuba, este año (2011) en Dinamarca y en 2012 se realizará en Vietnam. A instancias del ministro de Turismo de la Nación, Enrique Meyer, las autoridades de la UEA pusieron sus ojos en Rosario para proponerla como sede del congreso en 2014.

En la oportunidad, Fein dio la bienvenida a los visitantes y señaló que "a partir del Congreso de la Lengua Española en 2004, Rosario se ha ido posicionando en cuanto a la organización de eventos y eso nos pone muy contentos porque la gente de Rosario se involucra fuertemente con



este tipo de encuentros ya que tienen una alta repercusión en la sociedad".

Asimismo, agregó que "estamos a disposición de los organizadores y todo lo que esté a nuestro alcance lo vamos a hacer para ayudar. Además, el hecho de que este evento convoque a gente de distintas partes del mundo nos permite hacer conocer nuestra cultura. También es una buena posibilidad para que muchas personas de nuestra ciudad y la región que no pueden viajar participen de este tipo de congresos. Nosotros estamos trabajando fuerte para que Rosario sea sede de los Juegos Panamericanos de 2019, nos gusta pensar en el largo plazo pero trabajar desde el ahora. Este congreso de esperanto también es una buena posibilidad para hacerlo".

Por su parte, De Benedictis sostuvo que "la organización de este tipo de congresos internacionales genera un valor intangible de autoestima en la propia comunidad y eso es muy importante, es un buen motor. Nosotros estamos trabajando en turismo idiomático y este congreso podría ser un buen motivo para posicionar la ciudad".

De la reunión, que tuvo lugar en el Salón Belgrano del Palacio de los Leones, participaron también León Zozuch y Eduardo Krasnow del *Rosario Convention & Visitor Bureau*, y Eugenia Torriglia, del Instituto Nacional de Promoción Turística (Inprotur).

Según trascendidos en abril UEA deberá desidir entre Argentina o Sarajevo, (Bosnia-Herzegovina), la otra candidata al Congreso Mundial de Esperanto 2014.

Impulsobaires / 22 de diciembre, 2011

Mar del Plata.-

La Secretaría de Turismo de la provincia de Buenos Aires, a cargo de Ignacio Crotto, participó de la visita técnica que autoridades de la Asociación Mundial de Esperanto llevaron a cabo en Mar del Plata, con motivo de la realización del Congreso Mundial 2014.

Miembros de la entidad recorrieron hoteles y sitios para eventos a fin de evaluar la posibilidad de que Mar del Plata se constituya en la ciudad receptora de este encuentro internacional. La Asociación definirá la sede a fines de abril del 2012.

La última edición del congreso de carácter mundial se realizó en Copenhague (Dinamarca), las próximas tendrán lugar en Vietnam, en 2012, e Islandia, en 2013; y para 2014 se estima que se reunirán en el país sede alrededor de 2.000 personas.

En los últimos años la provincia de Buenos Aires se ha posicionado como centro receptor de congresos y reuniones debido al constante desarrollo de la estructura hotelera y de servicios de los diferentes destinos del interior. La ciudad de Mar del Plata lidera este segmento, con una gran diversidad de recursos y una excelente infraestructura para este tipo de eventos.

De la recorrida técnica participaron representantes de la Dirección Provincial de Producción y Asistencia de Eventos de la Secretaría de Turismo; autoridades nacionales y municipales; el bureau local; referentes de la *Universal Esperanto Association* y de la Liga Argentina de Esperanto.



Nia urbo centjariĝas

Juna urbo festas 100-an datrevenon.





Trajnstacidomo: ĉefa simbolo pri kreskado kaj progreso, sed nuntempe preskaŭ malaktiva.

Presidencia Roque Sáenz Peña estas juna urbo en la provinco Chaco.

Ĝi estis fondita la 1-an de marto 1912 fare de grupo da ekspediciistoj je la instrukcio de komandanto Carlos D. Fernández kiu esploris en la tiama Nacia Teritorio *Chaco,* en regiono de aborigenaj loĝantoj.

Dum tiu periodo argentina prezidento estis Roque Sáenz Peña kaj oni petis de li ke tiu nova urbo estu nomata per sia nomo.

La unuaj loĝantoj estis hispandevenaj sed baldaŭ alvenis al la nova urbo elmigrintoj de diversaj eŭropaj landoj i.a. italoj, poloj, ukrainoj, ĉehoj, slovakoj, bulgaroj, jugoslavoj, germanoj, araboj, judoj, ktp.

La ĉefa produktado de ĉiam estis kotono sed poste ankaŭ oni produktas grenojn kaj brutaron.

Nuntempe estas pluraj turismaj allogaĵoj: hotelo 4-stela Gualok; terma akvobanejo; regiona zooparko kaj rezervejo; historiaj muzeoj de la urbo ĉu municipa ĉu de ĉehoslovaka kolektiveco.

Historio de Esperanto

En la jaro 1946 prof. Milos Brunclink ekinstruis Esperanton al siaj gelernantoj de ĉeha lingvo en ĉehoslovaka asocio. En tiu kurso ĉeestis Juanita Calaba.

Jarojn poste, en 1976, fama prof. Tibor Sekelj vizitis la urbon kaj precipe jugoslavojn kaj parolis pri Esperanto tra loka radio-stacio LT16.

En la jaro 1987 Oscar Ostojic kontaktis profesoron Francisco L. Veuthey en najbara urbo Quitilipi, kie jam oni instruis Esperanton. Inter-konsente ili organizis E-kurson fare de prof. Veuthey en saenzpenja jugoslava asocio de marto ĝis decembro de la jaro 1988.

Entuziasmaj E-lernantoj tuj ekagadis favore al Esperanto kaj Argentina E-Ligo invitis la grupon organizi Argentinan Kongreson en la sekvanta jaro, (julio 1989).

La 49-a Argentina Kongreso de Esperanto estis oficiale aŭspiciita de la Municipa Registaro. La inaŭguro okazis ĉe “Club Social” kaj la programo disvol-



Finlernintoj de E-Kurso en E.E.T. nro 23 (julio 2001)

Néstor Casanova, Juanita Calaba de Schafheutle, Carlos Tony Stacul, Erica Frias, Oscar Ostojic, Emilia Simovic, Carlos Ortiz, Ana Muñoz de Pacheco, Rosita Rodriguez de Dutchen kaj Rubén T. Diaconu Tkachenco.

En novembro 1990 estis eldonita SEK-Bulteno, plejparte en la hispana lingvo. Gi aperis kiel presita versio de n-ro 1 ĝis n-ro 10 (1995) kaj atingis internacian dissendon.

viĝis en Hotelo Gualok. Argentinanoj kaj brazilanoj partoprenis la programon kaj ceremonion por nomigo de la placo kaj strato Esperanto.

Estis fondita SEK

La 20-an de aŭgusto 1989 estis oficiale fondita grupo SEK, **Saenzpenja Esperanto-Klubo**, kultura asocio sen monprofito.

La kunfondintaj ĉeestantoj estis: Francisco L. Veuthey, María Berna Morzán, Alicia Aranda,



Membroj de SEK kaj prezidantino de AEL Silvia Rottenberg dum la 2-a Renkontiĝo de Esperanto. (CE. CU. ID, majo 2009)



Esperantistoj kun urbestro C. Peche ĉe Placo Esperanto (2001)

Post longa paŭzo, en 2004 reaperis la n-ro 11 kaj la bulteno estis eldonita ĝis nun kun internacia dissendo al pli ol 33 landoj. Plej lastaj n-roj troveblas en la retejo www.gazetejo.org.

En la urbo oni trovas la Placon Esperanto en kvartalo *Oro Blanco* kaj bulvardon Esperanto en kvartalo *Sarmiento* kiel precipa montro de la E-agado dum pli ol 20 jaroj.

★

Argentinos en el mundo
Argentinanoj en la mondo

Intervjuo pri amrilato kaj esperantisteco

Artikolo de
revuo ***Familia Esperanto***
n-ro 50, septembro 2011.

Kial tiu stranga kombinaĵo de temoj?
Ĉar esti serioza esperantisto estas kvazaŭ edziĝi al Esperanto kaj la demando povas leviĝi kiu venas unuavice: la partnero aŭ la lingvo?



Marcos estas 27-jara germana esperantisto, naskita en Argentino, kien iam liaj geavoj elmigris el Germanujo. Li estas seriozega esperantisto kaj ambicia. En 2010 oni elektis lin esti la plej juna akademiano. Kiel tia li sekvas kaj komentas la evoluon de la internacia lingvo, kun 43 aliaj akademianoj.

Marcos havas edzinon, Uljana, kaj eĉ jam havas bebon dujaraĝan, Milena, dum liaj samaĝaj konatoj plejparte ankoraŭ ne pensas pri infanoj. Li renkontis ŝin dum 'Internacia Seminario 2004/2005'. La amo montriĝis stabila kaj post malpli ol tri jaroj jam ili geedziĝis. Ili komence demandis sin kion ili havas komunan, ĉar la rilato estis je distanco – li studis tiam en Britujo - kaj estis diferenca religiemo. Sed malkovriĝis ankaŭ komunaĵoj: política verduleco, ŝatado de kuirado, interesiĝo pri lingvoj kaj emo al frua planado de idoj. Uljana universitate studas du apartajn fakojn, orientslavajn studojn kaj instruadon de la germana lingvo al fremduloj.

La paro decidis kreskigi la bebon laŭ UPUL: paĉjo konsekvence parolas Esperanton, panjo la rusan kaj preskaŭ ĉiuj aliaj beb-rilatantaj personoj la germanan.

Jam junaĝa, Marcos havis la ideon ke li volas havi trilingvan familion! Do kia bonŝanco ke li renkontis ruslingvan knabinon (kiu cetere ankaŭ sciis la germanan, el germanlingva patrino; la geedzeco ne estas disnacilingva).

La multnacieco de la edzeco kongruis kun la maniero en kiu li travivis sian junaĝon. Lia patro, oficisto de Lufthansa (Germana aerflugokompanio), kaŭzis, ke la familio de Marcos ofte transloĝiĝis: al Ganao, Turkujo, Sudafriko, Egiptujo, Germanujo, Argentino, Brazilo, Germanujo. La lastajn tri landojn el tiuj li konas.

Ĉu Marcos kaj Uljana, kiel multodevena esperantista familio, ne staras iom ekster la mezuma vivostilo de sian samaĝuloj? mi demandis lin. Jes, opinias Marcos. Tiu stato malmulte malhelpas integriĝon en nova loĝloko – li transloĝiĝis al Bonn (ĉefurbo de iama Okcident-Germanujo). Tie li ne intense partoprenas la mojosecan vivon de dudekkelkjaruloj kaj iom hezitas deklari al siaj proksimuloj, kiam pridemandite, ke li havas kvindekjaran esperantistinon kiel 'amikon'.

Efektive Marcos facile miksiĝas kaj senĝene debatas kun grizuloj, kiel ekzemple kun mi. Li ankaŭ estas konata kiel iniciatinto de Bonlingva Vortaro, kiu celas kombini la plej bonan el la retdiskutlisto la-bona-lingvo, la Reta Vortaro kaj la baldaŭ enretigota *Plena Ilustrita Vortaro*. Lia argumentado estas rapida, la parolado hasta, la piedirado decidema. Baldaŭ la familio Cramer renove transloĝiĝos.

ESPERANTO INTERNACIA aktivas en Nikaragvo

La agado de ESPERANTO INTERNACIA en Nikaragvo ĝis nun estis eksterordinare sukcesa.

Inter la 24-a ĝis la 26-a de januaro ni povis prezenti informstandon ĉe la 3-a Nacia Kongreso pri Edukado en la nacia ŝtata universitato U.N.A.N. *(Universidad Nacional Autónoma de Nicaragua)*. Je la 25-a de januaro ni havis okazon prezenti sciencan prelegon (20 minutoj) antaŭ ĉirkaŭ 30-persona aŭskultantaro.

Krome okazis amasego da intervjuoj en diversaj amaskomunikiloj de la cefurbo Managvo dum kiuj ni havis la okazon detale prezenti la lingvon, ĝiajn avantaĝojn kaj ĝiajn trajtojn.

Listo de la intervjuoj inter la 23-a de januaro ĝis la 30-a de januaro:

1) Radio 580, viva intervjuo, 40 minutoj
2) Gazeto "Hoy" (Hodiaŭ), intervjuo, (apero de artikolo ĝis nun ne konfirmita).
3) Radio Advent Stereo (adventista radiostacio), viva intervjuo, 20 minutoj.
4) Radio "Ondas de la Luz" (evangelia radio), viva intervjuo, 20 minutoj.
5) Radio Sandino (radio-stacio, titolo: Tiel la afero), viva intervjuo, 20 minutoj.



Ŝildo-simbolo de UNAN

6) Televido Canal ExtraPlus 37, viva intervjuo, 50 minutoj.

Mallely konstante instruis Esperanton al kelkaj lernantoj.

Ni ĝojus se vi povus subteni la agadon!

Mallely Martinez Mateos (Meksiko)
Martin Schäffer (Meksiko)
Meyling Palma (Nikaragvo)

Informoj pri ESPERANTO INTERNACIA:
ESPERANTO INTERNACIA estas juna internacia organizaĵo, kiu koncentriĝas en sia laboro ĉefe al Esperanto-informado kaj Esperanto-instruado.

Pliaj informoj:
Esperantst@gmail.com

(Hispanligva artikolo sur paĝo 7)



U.N.A.N.

Ne timu la krizon. Ĝi forpasos, vi restos



Artikolo aperinta en centoj da gazetoj, revuoj kaj ttt-ejoj en Brazilo kaj en la mondo.

José de Paiva Netto (*)

En Brazilo, ĉies atentoj turniĝas al la sekvoj de la nuna monda krizo. Favore aŭ malfavore, politikistoj, ekonomikistoj, entreprenistoj, analizistoj opiniadas pri rimedoj, kiuj bremsas aŭ stimulas konsumadon, aŭ ion ajn, kio evitu, laŭ ilia pensmaniero, sociajn perturbojn enlande.

Malgraŭ ĉia maltrankvilo, ni sciu utiligi ĉi tiun momenton por atingi ekvilibron, sen kio malfacile ni atingos sukceson. Kio estas krizo, se ne oportuna okazo kun aspekto de malfeliĉo? Baroj estas premioj de Dio al nia inteligenteco, stimulo al tiu, kiu ne rezignas pri agado, kiu pravigas la vivon, kaj donas al ĝi koloron. Tiam oni plej bone povas utiligi sian talenton. Ĉia malsukceso enhavas en si mem solvon, tiel instruas la antikva kaj saĝa orienta kulturo. Plendado nenion konstruas. Ni devas kontraŭbatali malentuziasmon, sen trompado al la homamaso. Homoj kaj nacioj, kiam ili fariĝas senesperaj, sendefende falas aŭ stariĝas ribele.

Saĝeco de Konfuceo

Necesas revadi, helpi por ia pli digna mondo. *Pari passu*, oni havu la piedojn firme sur la grundo, tio estas, oni estu certaj, ke deziratajŝanĝoj ne alvenas sen efektiva penado. Ni meditu pri ĉi tiu perla saĝa penso de **Konfuceo**: *"Se ni sufiĉe antaŭe starigas nian konduton en la vivo, tiam nin neniam atakos afliktiĝo. Se ni antaŭe scias, kiuj estas niaj devoj, tiam ni facile plenumos ilin"*. Simpla planado.

Cetere, la filozofion de tiu respektata ĉina majstro oni konsideras kiel unu el la fundamentoj de la rimarkinda impulso, kiu aperigis "aziajn tigrojn", kiuj nuntempe estas ankaŭ skuataj de la tutmonda streĉo. Okaze de renkontoj inter ekonomie gravaj landoj en la mondo – kompreneble pelataj de instinkta klopodo por pluvivado – serĉe de sanaj rimedoj por alfronti la krizon, estas tamen nepre necese, ke racio plektiĝu kun spirito de solidareco (io ankoraŭ malofta ĉe tiaj internaciaj rilatoj), ĉar la koro pli emas ĉiam aŭdi, kiam frateco estas efektive la fundamento de dialogo. Ili iam komprenos, ke sen amo, aŭ kiu ajn nomo en la "teknologia lingvo" oni uzos, oni nepre trovos tiujn grandajn suferojn antaŭdiritajn de **Jesuo** en Lia Evangelio, laŭ **Mateo**, en la tuta ĉapitro 24. Krome, la vivo estas ia konstanta sin-pravigo ĉe tribunalo de la konscienco, de kiu neniu povas forkuri, eĉ se ĉio restas por ĉiam kaŝita.

Energia sinteno

Nerenversebla sinteno estas oportuna respondo antaŭ ĉia krizo. (...) Ni ne forgesu, ke – kiam ni restadas ĉe Dio – tiam eĉ malfeliĉo montriĝas kiel favora okazo por kreado.

Ekzistas tiuj, kiuj pasigas jarojn atendante plej malbonajn okazojn. Nur tio sufiĉas por malsanigi homon. Kial ne celi la plej bonan kaj klopodi labori por tio? **Thomas Jefferson** (1743-1826) memorigas nin pri ĉi tiu frapanta realaĵo: *"Kiom kostis al ni malbonaĵoj, kiuj neniam okazis!"*. Kaj krome ekzistas rusa proverbo, kiu konsilas: *"Kredu Dion, sed plu naĝadu al la marbordo"*.

Mia solidara penso al ĉiuj, popolanoj kaj registoj, kiuj alfrontas malfacilaĵojn, ne mallevas la standardon kaj honoras siajn familiojn kaj la

patrujon, kaj tiel postvivas pli laboremaj kaj pli fortaj. Nia lando daŭre klopodas sin defendi de la tempesto, kiu nuntempe malkvietigas aliajn popolojn. Bona batalo liveras al ni valoran okazon por progreso.

Jesuo tamen ne krizas. Ni do petegu Lian protekton.

Jerusalemo kaj Novjaro

Ĵurnalisto **Francisco Periotto** skribis al mi pri la artikolo "Novjaro kaj homa agado": *"Bonega estas la temo supremenciita, nome via frata-ekumena analizo, kiu inkludas Jerusalemon. Vi tre trafe kunigis Novjaron, Apokalipson kaj esperon, entute kondukante al la kredo, ke nenio estas senespera, ĉar per renovigata fido pri Dio, nome pri la toleremo inter la homoj, eĉ se ili estas diversaj, tiam oni ja havos grandan jaron 2009. Mi tre ŝatis!"*

Dankon, Francisco. Nu, religio ne kongruas kun turmento.

Spiritaj valoroj

Mi dankas pro la paroloj de radiaŭskultanto de *Supera Reto Bona Volo*, AM 1300, **Paulo Nonnemacher**, el la urbo Estância Velha/RS, Brazilo, okaze de la programo Komando de Espero: *"Liaj artikoloj estas tre gravaj por la popolo de Rio Grande do Sul, ĉar ili altigas spiritajn aferojn, kiuj estas esencaj por la homo kaj ĉiam plifortigas, ĉiam klarigas la komprenon de la socio, ĝenerale, pri la maniero progresi en la vivo"*.

Nonnemacher, viaj paroloj estas stimulo al tiuj, kiuj serĉadas ĉe spiritaj valoroj harmonion necesan por superi la suferojn de la homa vivo.

*(*) **José de Paiva Netto**, verkisto, ĵurnalisto, radikomunikanto, komponisto kaj poeto, naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro, RJ, Brazilo. Li estas Direktoro-Prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI Inter), de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Beletra Akademio en Centra Brazilo, de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj en Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj en Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radikomunikistoj en Rio-de-Ĵanejro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC)*

Kion ili diris

Instr. César Dorneles Soares
www.blogo21.blogspot.com

Estas du senfinaj aferoj: la Universo kaj la stulteco de la homoj.

Albert Einstein

Kiel defendi iun civilizon kio estas tio nur en la nomo pro tio, ke ĝi reprezentas la kulton al la bruteco kiu ekzistas en ni, la kulton al la materio?

Gandhi

Iam la bestoj parolis; hodiaŭe ili eĉ skribas.

Barono el Itararé

Sekso estas tiel bona, ke ĝi kontentigas la kvin sentojn samtempe.

Israel Ziller

Sekso: kunhelpo
Kiso: kareco
Brakumo: amo

Helom

Virtuala sekso estas la manko de sekso farita publika.

M. M. Soriano

Mi estas mallerta por sufiĉe bone paroli por esti nekomprenebla.

Jane Austen

Vi ne legas [grandajn poetojn] por kontroli sian sencon aŭ la verecon de sia propra mondsperto, sed nur pro tio, ke vi deziras sorbi ilian voĉon.

Mark Strand

La 3 plej grandaj mensogoj en interreto:
1. Mi legis kaj konsentas kun la uzregularo. 2. Stato: Okupita
3. Mi estas pli ol 18-jara.

@APiada

A N O N C O J

Nia celo

La ĉefaj celoj de SEK-Bulteno estas: **Unue** informi pri Esperanto en nia regiono kaj en la mondo al neesperantista publiko. **Due** infomi pri kelkaj E-aktivaĵoj al esperantistoj. Tio estas la kialo de la plimulta hispanlingva materialo eldonita.

Atenton!

Se vi ŝanĝis vian poŝtan adreson aŭ ret-adreson bv sciigi al nia Redakcio. Antaŭdankon.

Forpasoj

La ĉeĥa Esperanto-verkistino kaj Honora Membro de UEA **Eli Urbanová** forpasis la 20-an de januaro 2012 en Prago. Ŝi naskiĝis la 8-an de februaro 1922. Profesie instruistino, ŝi esperantistiĝis en 1948 kune kun Štefo Urban, ŝia edzo ĝis 1955 kaj aŭtoro de la versa fablaro "Nova Ezopo" (1961). Ambaŭ membriĝis en la Praga Esperanto-Klubo en 1949 kaj baldaŭ ekverkis en Esperanto. Jam en 1940 Eli Urbanová aperigis poemaron en la ĉeĥa. En la periodo 1952-1957 ŝi ricevis dek premiojn en literaturaj konkursoj, i.a. la unuan premion pri poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1954.

La elstara kroata esperantista aktorino **Vida Jerman** forpasis la 10-an de decembro 2012 en Zagrebo en la aĝo de 72 jaroj. Ŝi naskiĝis la 28-an de majo 1939. Kroataj amaskomunikiloj, kiuj vaste raportis pri ŝia forpaso, karakterizis ŝin kiel legendon de la kroata teatro. Saman statuson ŝi akiris ankaŭ en la Esperanta teatro. Al la Esperanta teatro Jerman kontribuis ekde 1973. Plurajn verkojn ŝi ripetis ankaŭ en postaj UK-oj kaj prezentis ilin ankaŭ en IJK-oj, SAT-konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj. Kun grupo de artistoj el Zagrebo Vida Jerman fondis en 1997 la teatran trupon Ponto, kies arta direktoro ŝi estis. Krom en Esperanto, la trupo prezentis ankaŭ en aliaj lingvoj. En 1996 ŝi publikigis la sonkasedon "Teatra vespero de Vida Jerman". Ĝi estas registraĵo de "Inventante ke mi songas" kaj de la recitalo de kroataj poetoj "Izolulo", kiun ŝi prezentis i.a. en la UK en Seulo (1994). Ŝi estis membro de la prezidantaro de Kroata Esperanto-Ligo, longtempa membro de UEA kaj fakdelegito pri teatro. En 2010 la Estraro de UEA rekonis ŝiajn grandajn meritojn al la Esperanto-kulturo per Diplomo pro Elstara Arta Agado. En 1997 la prezidento de Kroatio distingis ŝin per ordeno pro ŝia kontribuo al la teatra arto kaj prezentado de la kroata kulturo en- kaj eksterlande.